

Leberecht Dreves,

Arbar-adoro

tradukita de Joachim Gießner

Matene, kiam krias kok'
 Kaj ne varmiĝas jam aer',
 Eĉ antaŭ la koturna vok'
 Nur eĥas korn' tra la eter'.
 La kara Dio laŭ emo Sia
 Kviete iras tra l' arbar'.

Lin aŭdas veni plaŭda font'
 Kaj ĉesas tur murmuri ĝi.
 Estime Lin l'arbare mond'
 Omaĝas en sincer pi'.
 La arboj revas: Nun ni mallevas
 La branĉojn antaŭ nia Di'.

Vekiĝas la floretoj nun,
 Ja sentas tuj: jen la Sinjor'.
 Kaj ili antaŭ venos Sun'
 L'okulojn viŝas kun fervor'.
 Kaj frustras kore, al Li adore:
 Kar-Dio iras tra l'arbar'.

*Traduko de la Germana poemo "Waldandacht" de LEBERECHE DREVES (*1816-09-12 – †1872-12-19) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-611-1229 (2012-10-11 22:02:18)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>. Informoj pri la komponisto Franz Abt troviĝas en http://de.wikipedia.org/wiki/Franz_Abt.